

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Sechster Jahrgang

★ LA PONTO ★

Nr. 9 September 1953

OFICIALA REVUO DE LA GERMANA ESPERANTO-ASOCIO
KAJ DE LA GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

LA 38-a UNIVERSALA EN ZAGREB BRILA MANIFESTACIO DE NIA LINGVO SUR LA BALKANO

La kongresanoj de la 38-a Universala Kongreso alvenis al Zagreb per ĉiuj eblaj trafikrimedoj: vagonaroj, aviadiloj, aŭtobusoj kaj eĉ per bicikloj. La ĉefurbo de Kroatujo akceptis **1760 delegitojn el 30 diversaj landoj**, kiuj kolektiĝis por manifesti la forton kaj universalecon de nia movado en aparte solena vesto. La montrofenestroj kaj tramveturiloj estas ornamitaj per Esperanto-flagetoj. Sur la ĉefaj placoj kaj trafiklokoj (ĉefa stacidomo, Placo de l' Respubliko, Laborista domo) kaj aliloke flirtas, krom la naciaj ankaŭ la Esperanto-flagoj. La loka ĵurnalo „Narodni list“ aperis kun aparta Esperanto-aldono, ĉiutage dum la kongreso. La aliaj landaj gazetoj estis plenaj je diversaj detalaj raportoj pri la plej grava internacia kongreso en tiu ĉi parto de Eŭropo.

Tiu ĉi kongreso estas grava ne sole pro la fakto, ke ĝi estas la unua tiaspeca kongreso sur Balkano, sed ankaŭ pro hazarda koincido kun la 30-jara datreveno de la 1-a Jugoslaviana Esperanto-Kongreso. La registaro malavare subtenis la kongreson. Jugoslaviana ŝtata fervojdirekcio aprobis 50 %-an rabaton por la partoprenantoj. La poŝto eldonis du apartajn poŝtmarkojn kun memoriga stampo, kaj la Filatelista Asocio eldonis unuatagan koverton kaj Esperantan poŝtkarton.

Vendredon, 24-an de julio: En hotelo Esplanade kunsido de la Estraro de UEA, Prezidantaro de la Kongreso, kaj LKK kun ĵurnalistoj.

Sabaton, 25-an de julio, posttagmeze: Malfermo de filatelia ekspozicio en la ĉefpoŝtejo kun aparta Esperanto-angulo.

Vespere: Interkona Vespere kaj Balo. Iuj maliculoj nomas ĝin la granda babilado, kiu en tiu ĉi rilato ne estas malbona, ĉar estas la demonstracio pri parolebleco en Esperanto. Nun en Zagreb ni havis feliĉon ke ĝi okazis sur granda teraso de l' hotelo Esplanade, en kiu loĝis kelkaj centoj da samideanoj. La hotelo, riĉe ornamita per flagoj de ĉiuj nacioj partoprenantaj la kongreson, donis gajan

noton al tiu ĉi vespero. La neesperantista publiko, dissemita inter la esperantistoj, rigardis kun miro tiun ĉi amason da fremduloj, vigle diskutantaj, ridantaj kaj videble tre kontentaj. Speciale altiris atenton la kostumoj naciaj, portataj de belulinoj el nordo kaj sudo kaj okcidento. La vesperon agrabligis tre vigla muziko sub nokta ĉielo. Ne forgesata estu ankaŭ la bona servado de manĝoj kaj trinkaĵoj en hotelo Esplanade, kies kelneroj faris sian eblon por kontentigi la eksterlandajn gastojn.

La solena inaŭguro

Dimanĉon, 26-an de julio ĝi okazis en la koncertsalono de la Foirejo, feste ornamita; ĝi povas enteni pli ol 2000 homojn kaj estis plenplena. Ĉe la longa tablo sidis meze la Honora Protektanto de la kongreso, d-ro Vladimir Bakarić; la urbestro de Zagreb, s-ro Većeslav Holjevac; s-ro Pierre Lebar, reprezentanto de UNESCO, la kongresa prezidentaro kaj la estraro de UEA. Post la tablo sidis la registaraj reprezentantoj kaj la LKK-anoj. En la fono de la scenejo pendis la granda kongresa flago, ĉirkaŭita per naciaj flagoj. Sur la kolonoj en la salono estis pendigitaj flagoj de nacioj reprezentataj ĉe la

Kongreso. Eksonis la himno nacia; poste edife tuŝis niajn orelojn la uverturo je „Egmont“ de Beethoven, solene prezentata de militista orkestro. Bonvenigan saluton direktis al ni en Esperanto la urbestro de Zagreb, s-ro Većeslav Holjevac, kiu trovis grandegan aplaŭdon. Post li la prezidanto de UEA, s-ro Ernfrid Malmgren, inaŭgure salutis la eminentulojn, antaŭ ĉiuj la prezidanton de la Kroatia Registaro, d-ro Vladimir Bakarić, kaj s-ro Lebar, observanton de UNESCO. Menciinte la fruajn paŝojn de d-ro Privat por nia afero ĉe la Ligo de Nacioj, s-ro Malmgren komunikis, ke en preskaŭ ĉiuj ŝtatoj-membroj la Unesko-representantoj jam sin turnis al la landaj asocioj por akiri kompetentajn informojn pri nia movado. Sed li avertis, ke tio ne estu nia sola laborcelo, ĝi estu nur malgranda ero en nia ampleksa laboraro kiu jam dum 66 jaroj nin kondukas „kuraĝe antaŭen... ĝis ni atingos la celon en gloro“.

En tre flua Esperanto nun parolis la honora prezidanto de la kongreso, la prezidanto de la Kroatia Registaro, d-ro Vladimir Bakarić. Lia persona ĉeesto estis grandega honoro por la kongreso. Lia parolado estis tondre aplaŭdata.



Poŝta dokumento pri la unua tago de la 38-a.

La prezidanto de LKK., d-ro Boro-večki, elokvente bonvenigis la aŭskultantojn nome de la enlanda esperantistaro.

Ok registaroj oficiale delegis reprezentanton por diri siajn bondezirojn al la kongreso, nome:

la aŭstralia, aŭstria, belga, franca, nederlanda, norvega, svisa kaj la sveda.

Franclingve la observanto de UNESCO, s-ro Lebar, turnis sin al la kongresanoj, kaj prof. Privat tradukis. Li alte taksas la idealojn al kiuj ni direktas nian fervoron kaj volas kolekti impresojn por objektivite sin teni ĉe la ĝenerala kunveno de UNESCO en Montevideo venontjare.

Post longedaŭra aplaŭdo la kongresanoj per levigo honoras ankoraŭfoje la personan ĉeston de d-ro Bekarić kaj s-ro Holjevac, kiuj pro gravaj laboroj devis forlasi la kunvenon.

Sekvis la salutoj de la landaj asocioj. Por GEA salutis s-ano Michling, Hannover.

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

f-ino Samblebe

Reĝa Belga Ligo: s-ro Herion

Flandra Ligo Esperantista: s-ro Tousseyn Camille

Brita Esperanto-Asocio: s-ino Kennedy

Centra Dana Esperantista Ligo:

s-ro Kühmann, Gustav

Franca Ligo Esperantista: s-ro Philip

Itala Esperanto-Federacio: s-ro Saggiore

Jugoslavia Esperanto-Federacio:

s-ro Zlatnar, Peter

Nederlanda Esperanto-Asocio „LEEN“

s-ro Mabescione

Norvega Esperanto-Ligo: s-ro Karterud

Sveda Esperanto-Federacio:

s-ro Dahl, Einar

Svisa Esperanto-Societo: s-ro Laederach

Esperanto-Asocio de Nordameriko:

d-ro Solzbacher, William

Aŭstria Esperantista Federacio:

d-ro Frenzel, Hans

Finnlanda Esperantistaro: d-ro Lappi

Germana Esperanto-Asocio: s-ro Michling

Indonezia Esperantistaro: s-rino Datoe

Toemenggoeng

Izraela Esperantistaro: s-ro Engelšer

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

f-ino Breeze ne sukcesis saluti pro

lastmomenta alveno

Komence de sia festparolado d-ro Privat substrekis, ke li dum sia 50-jara esperantisteco vizitis Jugoslavion plurajn fojojn kaj esprimis ĝojon, ke la kroata nacio kune kun la aliaj jugoslavaj nacioj havas rajton diri sian vorton al la homaro. Poste li parolis pri la tri epokoj de nia movado kiujn li vidis: la unua, kiam ni esperantistoj ankoraŭ ne rajtis paroli al la homaro; la dua, kiam Hektor Hodler fondis la nunan UEA., kaj la tria, kiam ni post terura ventego devis ree labori kaj ĉion rekonstrui. Li aparte substrekis tiun kulturalan rekonstruon, al kiu devas celi nia laboro. En UNESCO — li diris — oni konsideras nian movadon kiel armeon da malriĉaj humilaj homoj kiuj faras grandan laboron. Guste tiu fakto estas la ĉefa kaŭzo de ilia intereso pri internacia lingvo, kiu ne devas esti monopolo de intelektuloj, sed devas esti je dispone al grandaj amasoj havantaj pli da sperto ol la limigitaj mensoj de multaj — ne de ĉiuj — intelektuloj.

Kiam d-ro Zamenhof kreis Esperanton, li pensis al ĉiuj homoj, sed precipe al homoj humilaj kaj kun homeca sento.

Sian paroladon li finis per jenaj vortoj: „Spite al ĉiuj sukcesoj ne pensu, ke ni morgaŭ ricevos la oficialan rekonon. Longan laboron mi profetas al vi. Instruu la lingvon al

junuloj, ke ankaŭ ili festu sian 50-jaran jubileon. Notu bone, ke neniu povos mortigi tiun lingvon kiu havas kaj kunportas la spiriton de Zamenhof, kiu estas la spirito de la homaro.“

Entuziasme kantate eksonis la Himno en la vasta salonego kaj finis la inaŭguran ceremonion. Al proksima sportejo iris la amasoj por atendi en sunbrilego la grupigon por la granda oficiala kongresfotografado. Nun fine estis okazo por manĝi kaj ripozi.

Dimanĉaj kunsidoj

La posttagmezo de la dimanĉo estis dediĉita al kelkaj specialaj kunsidoj. La kunveno de la Akademio de Esperanto okazis je la 15-a sub la prezido de ĝia prezidanto ing. J. R. G. Isbrucker. Oni tie parolis pri la okazintaj reelektaj por la Akademio kaj tuŝis kelkajn lingvajn problemojn.

Je la sama horo f-ino Dédieux malfermis fakan kunsidon de la instruistoj. Antaŭ la reprezentantoj de ses landoj oni pridiskutis la demandojn pri informilo por ILEI. „Esperanto et Culture“. Aliaj temoj kiel seminarioj, koresponda centro,

kunlaboro kun la mondfederacio de instruistoj kaj UNESCO sekvis.

Du horojn poste s-ano M. Gjiivoje prezentis lumbilde kulturalan prelegon pri Zagreb, ĝiaj ĉefaj vidindaĵoj kaj kulturaj monumentoj. La ĉeestantoj sekvis kun granda intereso tiun duonhoran spiritan rondveturadon tra la kongresurbo.

La sesan laborperiodon de la Internacia Somera Universitato inaŭguris prof. d-ro J. Badalić, kaj precize je la 20-a d-ro E. Privat komencis sian prelegon pri la Usona kaj Svisa Federacioj. Je la 21-a prof. G. Waringhien pritraktis la problemojn de tradukarto ĝenerale kaj de Esperanta poezio speciale.

Ekster la kadro de l' kongreso okazis poŝtista kunveno en laejo por PTT-oficistoj. Oni instigis al profundo aŭ revivigo de Internacia Akademio por Poŝto kaj Telekomunikado. Oni rekonis la grandan helpecon de internacia lingvo. En voĉdonita rezolucio oni salutis kaj aprobis ĉi tiun utilan kaj gravan entreprenon kiel fortan kontribuon sur la kampo de kultura kreado kaj internacia kunlaboro, kiu servos al ideoj de frateco kaj paco en la mondo. (Daŭrigota)

La 26-a kongreso de SAT

okazis samtempe kun la „Universala“ en Wortley Hall, kastelo kun belega parko, ne malproksime de la industria centro Šefildo (Sheffield), Britio. Partoprenis 190 personoj, pli ol la duono el Francio, la aliaj el Britio mem, Nederlando, Svedio, Germanlando, Belgio kaj Danio. Estis harmonia familia kongreso kun multvara programo.

La solenan malfermon sekvis publika kunveno kun muziko antaŭ la kongresa domo.

Tri laborkunsidoj okupis tri matenojn de la semajno. En ili oni traktis kaj akceptis, preskaŭ unuanime, la raportojn de la gvidinstancoj. La propono pri la Esperantigo de la propraj nomoj en Esperanto estigis fruktodan ide-interŝanĝon.

Okazis kvin prelegoj kaj unu demandvespero, ĉi-lasto pri la stato de la brita laborista movado. La prelegoj temis pri sindikata kaj kooperativa movadoj, pri la idearo en la verkoj de Romano Rolland, pri racio kaj mistiko, pri sennaciismo kaj Belamiismo, pri Islanda socia kulturo, ĉi-lasto kun lumbildoj.

Flanke de ĉi tiu kleriga laboro oni ekskursis al Jorko (York), Castleton (kavernoj) kaj Haddon Hall (mezepoka historia domo).

En la kastelo de Wortley Hall mem, apartenanta nun al la laborista movado, oni vidis regionajn dancojn kaj plezurigan varietean programon prezentitan de la kongresanoj mem.

El la gvidrezolucio de la kongreso:

La Kongreso, aprobinte la raportaron de la Plenum-Komitato kaj de la ceteraj instancoj de la Asocio, rekonfirmas, ke la praktikado de Esperanto por konkretaj taskoj kaj celoj estas la plej bona pruvilo pri la fakta valoro de Esperanto, sekve

la plej taŭga maniero de propagando. SAT havas tiajn taskojn, kiuj povas instigi homojn lerni Esperanton. Sekve necesas diri ĉies atenton, en la laboristaj medioj, ree kaj ree al la ekzisto kaj agado de nia Asocio...

La Kongreso kun firma optimismo vokas al ĉiuj SAT-anoj, daŭrigi sian kulturalan kaj edukatan laboron kaj krei kontaktojn novajn kaj konservi kontaktojn malnovajn kun samideaj amikoj en kiel eble plej multe da landoj kaj regionoj de la tergloblo, eĉ tie, kie nia movado ne estas tolerata kaj estas persekutata (de la regantoj). Tiamaniere ili kuraĝigas la trafitaĵajn kamaradojn por eltenadi ĝis la momento, en kiu falos la nunaj malhelpaĵoj kaj ili ree povos aliĝi libere.

Germana Esperanto-Hejmo

atendas vin! — Vizitu la internacian kurac-urbon

Baden-Baden

(kuracado, ekskursado, sporto, amuzado)

loĝante en la Esperanto-Hejmo

Haus Agnes

Baden-Baden, Werderstr. 14,

Germanujo, tel. 30 35

Belega situo, modernaj ĉambroj kun fluanta akvo kaj centra hejtado, balkonoj, banejoj. Hejmo taŭga por unuopaj gastoj kaj karavanoj.

Moderaj prezoj.

Petu detalajn informojn esperantlingvajn de s-ino Agnes Miller.

Lingva imperialismo

kaj la situacio de la germana lingvo en internacia vivo



Inter la profundaj ŝanĝoj de nia mondo unu el ĝi ne rimarkigas videble por la publiko. Tio estas la grava pozicio-ŝanĝo de la tielnomataj mondlingvoj, la angla, la franca kaj la germana. La nuna vico estas alfabeta, ne laŭ-ranga; ĝi estis tia antaŭ la unua milito kun la sola modifo, ke la franca ĝenerale estis la oficiala peradingvo, la idiomo de la diplomataj kaj de la ŝtataj kancelarioj en internaciaj rilatoj. La rangvico estis do franca, angla kaj germana. La unua milito jam faris breĉon en tiu ĉi pozicio en tiu senco, ke la franca fariĝis dua, dume la germana cedis terenon favore al la angla. Lingvisto Meillet en sia multe legita verko „*Les langues dans l'Europe nouvelle*“ skribis interalie pri la germana lingvo la jenajn priprenigajn vortojn:

„Spite tio la scio de la germana lingvo estas deviga por ĉiuj homoj dezirantaj esti kulturitaj. Ne ekzistas ia ajn parto de la homa scio kie la germanoj ne alportis al la deknaŭa jarcento gravegan kontribuon. Ne ekzistas lando kie la penso filozofia estis pli aktiva kaj influis eksteren. La scienco estis organizita, kaj tie kiel ili mem ne inventis, la scienculoj germanaj sciis ekspluati lerte kaj utile la inventaĵojn, faritajn alilande. Grupoj da laborantoj faris gravajn esplorojn materiajn; homoj kiuj ne estus povintaj ion trovi faris utilan laboron sub la gvido de ĉefoj dotitaj de iniciato. Nenialoke estis publikigitaj lernolibroj pli kompletaj, kie la tuto de scienco estis elmontrita. La eldonistoj germanaj, sin turnantaj al scienca publiko propra kaj eksterlanda, povis pli multigi la publikigaĵojn, kaj por ĉiu aferaĵo regule informi per novaj eldonoj konstante renovigitaj. Germanujo estas la lando de la grandaj bibliografioj bonege aranĝitaj. . . . Ne scii la germanan estas preskaŭ ĉiam rezigni por esti je la nivelo de la scienco kaj de la tekniko de sia epoko.”

Tion skribis franca lingvisto en jaro 1918! Spite la kontraŭstaro multfoja je io germana, post la unua milito, pli kaj pli la lernado de la germana reprenis sian pozicion kaj en internaciaj kunvenoj ĝi ĉiam estis samranga je la du aliaj cititaj lingvoj. Escepte en la **Ligo de Nacioj**, kie pro pure praktika kaŭzo la angla-franca fariĝis oficialaj, sed ĉiam kun la rajto uzi alian lingvon, tradukotan en la du. Peza kaj laciga sistemo.

Pli grava estis la perdo de la franca lingvo sur internacia kampo. La socia

strukturo en Eŭropo ja ŝanĝiĝis profunde. La forblovo de monarkioj kaj la suprenlevo de burĝaj kaj laboristaj medioj estis unu el la kaŭzoj. La novaj ŝtatestroj devenintaj el laborista medio plejparte ne posedis fremdajn lingvojn, kun kelkaj esceptoj. Malrapide sed persiste la angla idiomo penetris ĉien.

Tia estis la situacio ĝis la eksplodo de la dua milito. Ĝia fino lasis ruinojn, ne nur materiajn, sed ankaŭ spiritajn. Sur lingva tereno, la germana lingvo suferis la plej gravan baton en sia tuta historio. La germana havis tri uzad-sferojn: La germana regno, la ŝtatoj kie germana lingvo estas oficiala (Aŭstrio, Svislando, k. a.) kaj landoj kie vivis germana minoritato pli malpli forta (Ĉeĥoslovakio, Hungarlando, Rumanujo, Polujo por nur nomi ĉefajn.) Groteska fakto estis, ke en ĉi-tiuj landoj estis ĉefe la judoj kiuj flegis la germanan idiomon ja eĉ kun prefero. Krom la germanaj varoj ĉi-tiuj judoj disvastigis scion de la germana lingvo.

Je tio aldoniĝas la uzo de la germana kiel ĝin citis Profesoro Meillet kaj eĉ la komplikeco de ĝia strukturo ne malhelpis ke oni tamen lernis kaj uzis ĝin.

Tiun ĉi ekspansion detruis grandparte la faroj de la pasinta reĝimo. La kontraŭstaro je ĝi estis tiom forta, ke ekzemple en germanlingva Svislando la flegado de la enlanda dialekto (Schwyzerdütsch) travivis veran supreniron. Post 1945 ŝajnis ke la uzado de la germana ekster ĝiaj limoj estos efemera, okaza kaj malofta. Sed . . . kaj tio estas ankaŭ groteskajo . . . la franca idiomo same fariĝis viktimo de nova konstelacio tutmonda. Triumfas la angla, dank' al la grandega alporto de Usono en la decida batalo kaj posta rekonstruo de la ruinigitaj landoj.

Lingva imperialismo

La estreco de la angla estas hodiaŭ fakto ne preterpasebla. La situacio similas je tiu de la Roma Imperio post Cezaro kie la greka lingvo ludis — sub rezervo de ĉia proporcio — tiun de la franca nuntempe. Se la angla estas tutmonda uzadlingvo, ĝi tamen ne estas helplingvo. Ĝia lernado kaj uzado estas spite ĉio limigita kaj en multaj rilatoj primitiva. Tion ankaŭ ne forigis la forta subteno de la kripligajo prezentita sub la nomo de la BASIC-ENGLISH, same kondamnita al malsukceso kiel ia WELTDEUTSCH (WE-DE) de supernacista germana profesoro. Por kompletigi tiun-ĉi tendencon, simpligi nacian lingvon por servi kiel

internacia kaj sub la epiteto helpa, iuj francoj proponis la kreon de ia baza franca lingvo, le français de base. Ĉio tio tamen ne forigas la supre aluditan fakton ke la angla estras. Interesa estas nuntempe la lingva situacio de Germanujo, dividita en du partoj, orienta kaj okcidenta. En la sovjeta zono la rusa lingvo estas instruata en lernejoj, kun rezultato nekonata al okcidenta fakulo. En la brit-usona zono la angla ludas la rolon konatan, kaj en la franca tiu ĉi lingvo estas unua fremdlingvo . . . Oni povas diri, ke Germanujo kaj Aŭstrio estas lingva batalkampo. Lasta gajnanto estas la angla, pri tio ekzistas neniu dubo.

Por forigi tiun ĉi antagonismon, la supersagacaj saĝuloj okcidentaj eltrovis la novan formulon de ekzistanta situacio: la dulingvismo. Tio signifas: oni devas lerni unu alian e! la du (angla-franca) tiom bone ke ĉie oni povus esti komprenata. Sed por ne-anoj de la du cititaj lingvoj tio signifas ke ili devas lerni du, tute flanklasante la fakton ke ekzistas ankoraŭ aliaj postuloj ekzemple de la rusa, de la hispana kaj eĉ de la ĉina idiomo.

El tio oni facile konstatas, ke regas ĥaoso en la opinioj kaj en la rimedoj. La sola eliro, la unika solvo estas la adopto de la internacia lingvo, por kiu ni Esperantistoj laboradas. Pri la komplikajoj en la Eŭropa Defend-Armeo kun korpuzoj diverslingvaj ni povas fari al ni jam ideon. La ludo de interpretado ja ne estas komplimento por la homa saĝo.

La rolo de la germana Esperanto-movado

Kia devas esti la tasko kaj rolo de la germanaj Esperantistoj? Kelkaj ideoj estu permesataj al la verkinto, vivinta jardekojn en internacia urbo, meze de internaciaj konferencoj kaj kongresoj. Hodiaŭ la germana lingvo iel havas pozicion de kulturlingvo de granda popolo — **ĉe la periferio** de la decidaj momentoj historiaj. La foresto de la orientaj landoj en la tutmonda koncerto kaj en la Esperanta, senigas nian movadon precize de elementoj plej necesaj por akceptigi akordon pri Esperanto per popoloj efektive interesitaj. La germanaj Esperantistoj devus do preni tiun ĉi lokon per bona argumento **interna**: Defendi la propran lingvon, **ekstere** por helpi al la lingvaj minoritatoj, ĉeĥa, pola, hungara, rumana, por nur nomi kelkajn. La propagando neniel devas alpreni la aspekton ke nia movado estas kontraŭ la angla lingvo. Ĉiam ni devas diri, ke tiu

Fino sur paĝo 101

El ligoj kaj grupoj

Sudokcidenta Esperanto-Ligo (SOELO):

Pro sia elekto kiel prezidanto de GEA s-ano d-ro Herrmann ekŝiĝis el la estraro de SOELO. Lia provizora anstataŭanto estas la estro de la norda SOELO-distrikto, s-ano Heinrich Nischwitz, Bensheim, Wilhelmstraße 7. — La aŭtuna kunveno por la okcidenta (Palatinio) kaj la norda (Mannheim-Heidelberg kaj Sudheslando) distriktoj okazos la 20-an de septembro, 9.00 h, en Worms, gastejo „Domschänke“, Stefansgasse, proksime de la katedralo. — La kunveno por la suda distrikto (Bruchsal-Karlsruhe-Baden-Baden) estos en oktobro en Karlsruhe, okaze de la eŭropa semajno. La preciza dato ankoraŭ ne estas fiksita. Detalaj informoj sekvas.

Esperanto-Ligo Berlin (ELB):

La adreso de la ELB-oficejo estas: Adolf Sproeck, Berlin-Wilmersdorf, Am Volkspark 85 (telefono 97 67 79). — S-ano Wietrzynski demetis, laŭ propra deziro, la redaktadon de la Berlina Informilo. Nova redaktanto estas s-ano Hans Breitenbach, Berlin-Neukölln, Briesestraße 67. — Kontentigan rezulton havas la konkurso de la ligo pri nov-varbitoj: 18 novaj membroj estas sukcese atingita per konstanta kaj senlaca klopodo flanke de fervoraj liganoj. En la konkurso, kiu daŭradas, antaŭas ĝis nun s-ano Schneewis kun tri varbitoj. — La gazetaro en Berlin pli kaj pli interesiĝas pri nia movado. En la unua duonjaro 1953 jam aperis tiom da publikigoj pri aranĝaĵoj, popol-altlernejaj kursoj ktp. kiom en la tuta jaro antaŭa. — Inter la junularo kaj plenkreskularo ekzistas bona harmonio, kiu prosperigas la laboron por la komuna celo. La junulara grupo varbas subtenantajn membrojn. Ĉiu, ankaŭ plenkreskuloj, povas sin anonci, pagante nur 1.00 gm. kiel duonjaran kotizon. La subtenantaj membroj ricevas la informilon „Juna Voĉo“. Kiu interesiĝas, skribu al s-ano Hubert Krüger, Berlin SW 61, Hornstraße 4. — Hauptjugendamt Berlin ebligis per monsubtenado al 16 junuloj partoprenon en la internacia Esperanto-junulara renkontiĝo en Wörgl (Aŭstrujo).

La grupoj Bielefeld, Herford, Bünde kaj Detmold okazigos sian 9-an renkontiĝon la 20-an de septembro, 10.00 h, en Osnabrück, junularhejmo Schloßwall. Informojn donas s-ano Friedrich Damschen, Osnabrück, Arndtstraße 23.

Okaze de la Internacia Ferio-semajno la 19-an de julio kunvenis en Konstanz 30 gesamideanoj el Sudbadeno kaj Sudvirtembergo, laŭ invito de la nova regiona interkontaktilo „Verda Folieto“.

S-ano Epstein plenrajta membro de GEA

Inter GEA kaj s-ano Epstein estas farita jena akordajo:

Vergleich

Zwischen dem Deutschen Esperanto-Bund e. V., vertreten durch seinen Vorsitzenden, den Oberamtsrichter Dr. Herrmann in Lampertheim, und seinem Mitglied, Herrn Felix Epstein, Hamburg, Haynstraße 5, wird zur Beilegung sämtlicher Streitigkeiten über seine Mitgliedsrechte folgendes vereinbart, nachdem der jetzige Vorstand durch Beschluß vom 27. Juni 1953 den Beschluß des früheren Vorstandes vom 8./9. März 1952, durch welchen Herr Epstein aus dem Deutschen Esperanto-Bund ausgeschlossen wurde, aufgehoben hat:

1. Es wird anerkannt, daß Herr Epstein seine Mitgliedsrechte durch den aufgehobenen Beschluß nicht verloren hat und darum vollberechtigtes Mitglied des DEB ist.
2. Herr Epstein anerkennt, daß durch die Aufhebung seines Ausschlusses hinfällig geworden sind:
 - a) das von ihm eingeleitete Schiedsgerichtsverfahren,
 - b) das von ihm vor dem Frankfurter Kongreß beim Landgericht München eingeleitete Verfahren auf Erlaß einer einstweiligen Verfügung wegen Anerkennung seiner Mitgliedsrechte (5 Q 15/53).
3. Herr Epstein verzichtet zugunsten des Deutschen Esperanto-Bundes auf die ihm gemäß Urteil des Münchener Amtsgerichts vom 21. Mai 1953 zustehende Erstattung seiner Reisekosten.

4. Der DEB übernimmt die in diesen drei Verfahren entstandenen Kosten.
5. Soweit hiernach Kosten an Herrn Epstein zu erstatten sind, stundet dieser die zu zahlenden Beträge bis zum 1. Februar 1954, jedoch mit Ausnahme der etwa noch unmittelbar an das Gericht zu zahlenden Verfahrenskosten.

Dieser Vergleich wird in der nächsterscheinenden Nummer der Bundeszeitschrift veröffentlicht.

Lampertheim, den 28. Juli 1953
Deutscher Esperanto-Bund e. V.
gez. Dr. Herrmann, Vorsitzender

Hamburg, den 5. Juli 1953
gez. Felix Epstein

La estraro decidis ordigi, finofare, la aferon per ĉi tiu akordajo. La eksigo-decido fare de la malnova estraro estis evidenta maljustajo. La protestoj de s-ano Epstein estis akraj, sed ne senbazaj, kaj li nepre havis la rajton kritiki. Tion agnoskis intertempe ankaŭ du instancoj de la publika tribunalo en la privata proceso de D-ro Ziegler kontraŭ Epstein, kiel klare montras la motivo de la decidoj. La landa tribunalo en München lastinstance malakceptis la privatan akuzon de D-ro Ziegler kaj faris lin pagodeva pro la proceskostoj. Sajnas al ni ĝuste rigardi la aferon nun finita. Ni turnu niajn tutajn fortojn al nia laboro por la komuna celo kaj alvokas ĉiujn al energia kunhelpo.

Ili preparolis la estontan kunlaboron inter la diversaj grupoj kaj unuopuloj, kaj la eblecon fondi regionan ligon. Ili decidis aranĝi regionan konferencon dum la monato septembro en Tuttlingen. Gesamideanoj loĝantaj en la nomitaj regionoj estas petataj interrilati kun la du perantoj s-anoj W. von der Ley, (14b) Tailfingen, Brunnenstraße 73, kaj D-ro A. Paul, (14b) Tuttlingen, Möhringer Straße 70.

Esperanto-Unuiĝo Grand-Kolonjo

gastigis en la lastaj semajnoj multajn vizitantojn el eksterlando. En aŭtuno komenciĝos novaj kursoj. Ĝia ano s-ano Hans Wingen fariĝis membro de la regiona ekzamenkomisiono.

Grupo Bonn: La urba trafikoficejo en Bonn eldonis du pluajn faldprospektojn en 7 lingvoj, inter ili an-

kaŭ Esperanto. La prospektoj estas haveblaj kontraŭ reafranko ĉe la UEA-delegito Ernst Kind, Nordstraße 97, Bonn, aŭ ĉe la urba trafikoficejo, Poststraße 27/29, Bonn.

En la jarlibro de UEA 1953 la urba

Neues Postscheckkonto des DEB

Wir bitten unsere Mitglieder, sämtliche für den Bund bestimmte Geldbeträge künftig nur noch auf das neue Postscheckkonto Köln 310 84 einzuzahlen.

Das Konto läuft unter der Bezeichnung: Deutscher Esperanto-Bund e. V., Hauptgeschäftsstelle, Köln-Dellbrück, Bergisch-Gladbacher Straße 1095.

trafikoficejo presigis tutpaĝan varbanoncon.

Elementa lernejo en Bonn sendis pere de la ĉi tiea UEA-delegito desegnaĵojn por la ekspozicio de infandegnaĵoj en Stockholm, kiu estos aranĝata de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio kaj de la konata sveda ĵurnalo „Aftontidningen“ en la monato aŭgusto de ĉi tiu jaro.

La 25-an de junio s-ano Kind faris enkondukan paroladon pri Esperanto en kunsido de „Bund Europäischer Jugend, Kreisverband Bonn“. Ceestis ankaŭ studentoj kaj kunlaboranto de la filologia instituto de la universitato Bonn. S-ano Kind sukcesis konvinki ankaŭ la kontraŭulojn pri la uzebleco kaj neceso de Esperanto, kaj oni decidis rekomendi la lernadon de Esperanto al ĉiuj membroj de la eŭropa junularo.

Karavano de l' Turisma Oficejo de Danaj Esperantistoj kun 33 personoj vizitis la urbon la 14-an de julio. La gastoj estis akceptataj kaj gvidataj de s-ano Suermann.

La „Koresponda Kurso“ de la grupo bone progresas. Pli ol 40 lernolibroj jam estas venditaj, kaj multaj lernantoj ege laŭdis la kurson.

GEA-kongreso 1954

La estraro intencas okazigi la venontjaran kongreson de GEA sabate/dimanche la 1-an kaj 2-an de majo 1954. Membroj, kiuj konsideras ĉi tiun daton neoportuna, bonvolu sciigi siajn argumentojn ĝis fino de septembro al la prezidanto Dr. Herrmann, (16) Lampertheim/Hessen.

La kongresloko ankorau ne estas fiksita, sed verŝajne ni kunvenos en la federacia ĉefurbo Bonn.

Esperanto pruviĝis utila

La Etnologia Arkivo de la Universitato de Lund (Svedujo), kiu je siaj demandoj rilate la konsumadon de ĉevalviano, publikigitaj en la Esperanto-gazetaro, ricevis ne malpli ol 90 respondojn el 35 landoj, esprimis sian dankon al ĉiuj kunlaborantoj. „Tiuj efikeco kaj rapideco, per kiuj la informoj alvenis, kaj tiu zorgemo, per kiu la informdonantoj ekagis, meritas ĉiajn atenton kaj laŭdon. Estis granda avantaĝo povi uzi Esperanton kaj ĝian delegitsistemon ĉe la kolektado de ĉi-speca materialo.“

Ferio- ĝojoj



La konstruado de kasteloj en la sablo de l' marbordo apartenas sendube al la libertempaj plezuroj, tion pravas ankaŭ nia ĉi-supra bildo. Ĝi montras al ni simpatian nordgermanan samideaninon, kiu ĵus finis sian „fortikajon“ kaj nun kontente kaj invite me rigar-

INTERNACIA

amikeco

Ĉu la bildo ne estas bela simbolo por la popolliganta lingvo Esperanto? Malantaŭ la verdstela flago ni vidas anojn el tri nacioj, kiuj farigis geamikoj per la lingvo kaj pro la ideo Esperantaj: (de maldekstre) nederlandano, belgino kaj germano, kiuj kune kun aliaj samideanoj el tiuj tri landoj partoprenis en internacia renkontiĝo, kiun okazigis la Esperanto-grupo Düren (Rejnlando) la 19-an de julio en sia urbo. Estis impona manifestacio publika, kiu vekis grandan atenton en Düren. Cetere, estas jam kelkjaraj tradicio, ke samideanoj el la nomitaj landoj en la okcidenta parto de nia kontinento de tempo al tempo kun-



venas, por firmigi, trans la landajn limojn, la amikecan kontakton inter si. Post Liège, Maastricht kaj Düren sekvas nun, ankoraŭ en ĉi tiu jaro, pluaj renkontiĝoj en la belga banurbo Spa (septembro) kaj en nederlanda urbeto proksime de la limo (decembro), kie oni festos komune la Zamenhof-tagon. Kiu volas partopreni, skribu al D-ro H. Woelk, Düren (Rheinland), Kreuzstraße 67.

(Foto: D-ro Woelk)

Kiel vi pensas pri tio?

De multaj flankoj ni aŭdis la deziro, ke GEA enkonduku oficialan insignon (kaj honorinsignon). Oni proponis malgrandan rondan insignon: la verda stelo sur blanka fono ĉirkaŭita de mallarĝa nigra rando kun la enskribo „Germana Esperanto-Asocio“ aŭ, anstataŭ la nigra rando kun enskribo, randon en la germanaj naciaj koloroj (nigra-ruĝa-oreca). Ni ĝojus, se ni ricevus kiel eble plej multajn opini-esprimojn de niaj legantoj.

Bonvolu atenti!

Ligoj, grupoj, sekcioj kaj unuopuloj estas petataj sendi siajn raportojn kaj informojn destinitajn por publikigo en la asocia organo sufiĉe frue, sed plej malfrue ĝis la 25-a de ĉiu monato al la sekretario R. Reuchlin. Urĝaj informoj povas

esti sendataj, esceptokaze, senpere al la redaktanto de la oficiala parto ĝis la fino de la monato. Alie ni ne povas garantii publikigon en la neksta numero.

Personaj sciigoj

Naskiĝis fileto Michael al ges-roj Magdanz en Berlin.

Geedziĝis ges-roj Moser en Tuttingen.

Mortis profesoro Ernst Riedel, eksstudkonsilisto, malnova esperantisto kaj membro de la Hamburga Esperanto-Societo, je la sekvoj de aŭtomobila akcidento la 13-an de julio.

Lingva imperialismo

(Fino de paĝo 99)

kiu bezonas la anglan, francan, rusan aŭ alian por siaj propraj aferoj, lernu ĝin kaj lernu ĝin bone. Sed ni nepre opoziciu je la pretendo ke nacia lingvo povus esti la **helpa lingvo ĝenerala**. En oficiala komunikado de la Atlantika Defend-Armeo oni karakterizis la anglan kaj francan kiel help-lingvojn (langues auxiliaires) en la senco komprenata de ni.

Iam la Germana Registaro havis la eblecon defendi nian ideon antaŭ internacia forumo, la estinta Ligo de Nacioj. La politika stato de Germanujo tiam ne permesis tion. Hodiaŭ denove prezentiĝas okazo por diskutigi tiun ĉi problemon antaŭ la tutmonda forumo, la Unuigitaj Nacioj. Paŝo estas farita, per la enketo de UNESCO. Same kiel la cetera mondo ne povos senigi de la potencialo germana, same ni Esperantistoj ne povos atingi ion, sen la partopreno de la germanaj Esperantistoj. Ke ili komprenu la momenton kaj sciu agi en decida momento, kuraĝe kaj saĝe, tio estas la deziro de la verkinto.

das eksteren. Invite me? Jes, mi supozas tion, ĉar ŝia kastelo portas la belan nomon „ESPERO“, en kio ja pli-malpli kaŝiĝas la deziro akcepti gastojn. „Mia kastelo estas mia hejmo.“ Espereble la „ESPERO“ plenumis la esperon de la esperintino.

EŬROPO VOJKAS



ĈIUMONATA PAĜO POR LA EŬROPO - MOVADO ESPERANTISTA

Redaktanto: D-ro Jos. Holtmann, Beckum i. Westf., Hühlstr. 10

Esperanto - Brudersprache der europäischen Völker

„Kinderkreuzzug“
für die Verständigung

Frankfurt. Auf einer Tagung der europäischen Sektion des deutschen Esperanto-Bundes, die im Rahmen des Deutschen Esperanto-Kongresses in Frankfurt stattfand, sprach Dr. Holtmann (Beckum), einer der ersten Vorkämpfer der europäischen Bewegung in Westfalen, über das Problem „Europäische Verständigung durch Esperanto“. Der Redner wies nach, daß Esperanto eine „hocheuropäische“ Sprache sei, weil es seine Sprachwurzeln und seine Sprachregeln dem europäischen Sprachschatz entnehme. Er zitierte dabei den Ausspruch des englischen Univ.-Prof. Collinson, der gesagt hat: „Esperanto vereinigt in sich die Kraft der englischen, die Tiefe der deutschen, die Eleganz der französischen und den Wohlklang der italienischen Sprache“.

Der neue Vorsitzende des Deutschen Esperanto-Bundes, Oberamtsrichter Dr. Herrmann, habe schon vor einigen Monaten einen Entwurf für die europäische Verfassung ausgearbeitet, der die Einführung einer „hocheuropäischen“ Sprache für die Arbeiten des europäischen Parlaments fordere. Maßgebenden Persönlichkeiten sei dieser Entwurf zugesandt worden.

Mit seiner Anwendung im europäischen Parlament sei aber die Bedeutung des Esperanto keineswegs erschöpft. Es könne auch die Beziehungen der einzelnen europäischen Menschen zueinander günstig beeinflussen und dadurch ein europäisches Gemeinschaftsgefühl schaffen. Dr. Holtmann schlug einen „Kinderkreuzzug für Paneuropa“ vor in der Form, daß die Kinder Europas etwa vom 5. Schuljahr ab Esperanto lernen und dann brieflich und später auch mündlich Grüße und Meinung austauschen. Die Europa-Movado, so nannte der Redner die von ihm vertretene Richtung, unterscheide sich von andern paneuropäischen Bestrebungen dadurch, daß jeder einzelne Sende- und Empfangsstation sei, die tagtäglich mit dem europäischen Ausland in Verbindung stehe. Dieses System sei auch demokratischer als andere Systeme, die für den Meinungsaustausch die Kenntnis mehrerer Sprachen voraussetzen und es den „nichtstudierten“ Kreisen sehr schwer machten, sich als gleichberechtigte Europäer zu fühlen.

Im übrigen liege der Bundesregierung eine Anfrage des Generalsekretärs der UNESCO vor, in der die Bundesregierung über ihre Stellungnahme

Warum Europa-Movado?

Will ein kirchlicher Orden die Zersplitterung der Kirche oder ihre Schwächung? Ein Tor und Lügner, der das behauptet. Ebenso will die Europa-Movado nicht die Schwächung des Deutschen Esperantobundes oder gar der UEA. Sie richtet ihre Kraftanstrengung zunächst auf nur ein Ziel: das ist die Einigung Europas. Jeder, der Tag für Tag mit der großen Masse des Volkes in Berührung kommt, weiß, daß es die tiefste Sehnsucht der arbeitenden Menschen ist, in Frieden zu leben. Das ist in allen Ländern Europas der Fall. In keinem andern Kontinent ist die sprachliche Zerrissenheit so groß, in keinem andern Kontinent ist die Notwendigkeit der Überbrückung so zwingend wie in Europa. Dabei ist Esperanto eine in erster Linie europäische Sprache, weil es seine Sprachwurzeln und seinen Wortschatz den europäischen Sprachen entnimmt.

Ohne Übertreibung kann man sagen: 95 Prozent aller Paneuropäer sind für Esperanto. Nur fünf Prozent sind dagegen, und das meistens aus

zu Esperanto gebeten werde. Das Esperanto-Problem sei also keine Zukunftsmusik mehr, sondern aktuelle Gegenwartsfrage, insbesondere für Paneuropa.

sehr verständlichen, aber nicht sehr vornehmen Gründen. Sie wollen sich ein bestimmtes Einflußgebiet, die Beherrschung der Beziehungen zwischen den Völkern, als Monopol sichern. Sollen sich die 95 Prozent das gefallen lassen?

Unsere Antwort heißt: Nein. Organisationen, die sich zwar europäisch nennen, aber Esperanto, das Mittel zur Verständigung, durch Totschweigen oder Verächtlichmachung bekämpfen, lehnen wir ab. Freunde einer Einigung Europas mit Hilfe von Esperanto gehören in die Europa-Movado.

Gewisse Kreise wollen sich anscheinend dauernd damit abfinden, daß im englischen Besatzungsgebiet als erste Fremdsprache Englisch, im französischen Besatzungsgebiet Französisch und im russischen Besatzungsgebiet Russisch gefordert wird. Das kann nur ein vorübergehender Zustand für die „Eingeborenen von Trizonesien“ sein. Für jeden, der ein einiges Deutschland in einem einigen Europa will, kann die Lösung nur heißen: Zuerst Deutsch, dann „Hoch-europäisch“ (Esperanto) und dann die anderen Sprachen.

Ohne Geld kann keine Organisation wachsen. Mit einem Monatsbeitrag von 35 Pfg. können wir keine Kämpfe führen, können wir keine

(Schluß Seite 106)

Herzzerreißende Gleichgültigkeit

Das gilt besonders für Europa

Was General Lemann 1920 über Esperanto schrieb

„Man versteht nicht, warum die Idee, ein derartiges Verständigungsmittel einzuführen, nicht nur alle Wählermassen vereint, sondern dazu noch die ernsthaften Anstrengungen aller Menschen der Tat. Wenn man die andern Verbreitungsmittel wie Dampf, Elektrizität und Luftfahrt betrachtet, die den Wert der bisherigen Verfahren, Gedanken zu verbreiten und alle Transaktionen zwischen noch so weit entfernten Völkern durchzuführen, vervielfachen, so ist man verblüfft, daß die Menschheit, die auf der einen Seite so viel fordert, auf der andern so widerspenstig ist wie im Falle des Gedankens an die Vereinheitlichung der Sprachen. Man sieht doch sonnenklar, daß jeder Schritt auf dem Wege, die Sprache zu vereinheitlichen, so viel mehr wert ist, als tausend Schritte des Fortschritts auf irgendeinem andern Gebiet.“

Die Entdeckung Zamenhofs (die Hilfssprache Esperanto) ist die größte von allen, gesehen vom Gesichtspunkt einer Verständigungsmöglichkeit für die ganze Welt; sie ist dazu bestimmt, die Welt vom wirtschaftlichen Standpunkt aus zu erneuern und die Weltprodukte in einem ungeheuren Ausmaß zu vervielfachen. Man wird es nie verstehen, daß die Völker es nicht zu einer gebieterischen Pflicht machen, die Kenntnis der Hilfssprache als obligatorisch zu verbreiten, ohne sich darum zu kümmern, ob es dem einen oder andern paßt, einem derartigen Unterricht zu folgen.

Die Gleichgültigkeit ist wahrhaft herzzerreißend und veranschaulicht mehr noch als die Kriege die abscheuliche Barbarei, in der die Menschheit heute noch verharret.“

Was General Lemann 1920 schrieb, als die Einigung Europas noch nicht so dringlich war, gilt heute, wo Europa-Organisationen nur so aus der Erde schießen, in ganz besonderem Maße. Ist es nicht sehr verdächtig, daß sie Europa „einigen“ wollen, aber das Mittel zur Verständigung, Esperanto, ablehnen?



Trifoje akurate je la dekdua horo...

Romano de Walter Galders

E L L A G E R M A N A T R A D Ŭ K I S F R I E D R I C H E L L E R S I E K

Sepa daŭrigo

„Bon' tagon, Fiebig“, diris Opitz. — „Bon' tagon, sinjor' kriminal-konsilisto!“ — „Sidigu vin. Ĉu cigaron aŭ cigaredon?“ — „Cigaron, kompreneble, kaj tre malhelan, se mi rajtas peti!“

Opitz prezentis al Fiebig keston kun cigaroj, donis ankaŭ ekbruligitan alumeton kaj diris: „Nu, Fiebig, mi deziras aŭdi de vi ion ceteran.“

„Kion plian vi do volas, sinjoro kriminal-konsilisto? Mi ja konfesis ĉion. Pri kio mi do krome rakontu al vi? Ĉu pri la ŝtelenrompo en la muzeon, pri la surfasada grimrado en Kaiserallee aŭ pri kio alia?“

„Mi deziras ekscii ion pri via organizaĵo.“

„Ĉu pri nia organizaĵo? Ĉu vi pensas, ke mi donos al vi la membroliston?“

„Ne, tiel postulema mi ne estas, sed eble vi rakontos al mi ion pri la eksterlandaj interrilatoj de via organizaĵo.“

„Nu, estas ja kompreneble, ke ni laboras internacie!“ Fiebig fiere deklaris. „Unu lando sola ne povas fari ion; la sinjoro ministro ja diras tion ĉiutage. De jaroj ni kune laboras internacie sen festparoladoj kaj sen la Ligo de Nacioj. De ni la ŝtatistoj povus lerni ion.“

„En kiuj urboj troviĝas la filioj de via organizaĵo?“

„Sinjor' kriminal-konsilisto, vi estas afabla homo, kaj viaj cigaroj estas bonaj, sed bedaŭrinde mi ne povas servi al vi. Mi eble havus malagrablojn.“

„Kial malagrablojn?“ Opitz demandis kun arda intereso kaj ŝajnigita indiferenteco.

„Ne, pri tio mi ne povas paroli pli klare, ĉar mi trovas la vivon tre bela.“

„Ĉu vi volas diri per tio, ke via vivo estus en danĝero, se vi donus al mi pli detalajn informojn? Ĉu la Internacio por artaj-ŝtelado — tiel oni ja povas nomi vian organizaĵon — eble havas specon de femo?“

„Ne, ne, ŝparu vian klopodon, sinjor' kriminal-konsilisto, mi ne lasas min subesplori.“

„Ĉu vi povas diri al mi ion pri viro nomata Klebinder?“

„Ĉu Klebinder?“ Fiebig diris senmove, „iun Klebinder mi ne konas. Ĉu vi eble celas la firmon Fassbender? Tie mi kelkafoje aĉetis ĉokolad-konfitajon por mia fianĉino — bonega kvalito, mi certigas al vi. Sed plion mi ankaŭ pri Fassbender ne scias.“

„Ne, ne Fassbender, sed Klebinder mi diris.“

„Tiun viron mi ne konas. Eble mi iam faris ĉe li aferon, povas esti. Sed plej ofte mi ja eniris tra fenestroj, kaj tiukaze mi ne vidis la nomtabulojn ĉe la pordoj de la loĝejoj. Kio do mankas al tiu sinjoro Klebinder?“

„Klebinder mortis!“ Opitz diris malrapide, preskaŭ solene, esperante tamen surprizi Fiebig-on. Sed la nomo fakte ne ŝajnis impresi la malnovan ŝteliston.

„Ĉu mortinta estas la sinjoro?“ li diris. „Tion mi

bedaŭras. Mi tute ne eksciis, ke li estis malsana. Nu, bonvolu kore kondolenci liajn familianojn, kvankam ili ne konas min, ankaŭ en mia nomo, sinjor' kriminal-konsilisto.“

„Eble vi pripensos ĝis morgaŭ, ĉu vi konis tiun Klebinder“, Opitz diris kaj premis la sonorilbutonon. „Hodiaŭ mi bedaŭrinde ne plu havas tempon por daŭrigi la interparoladon. Estis por mi plezuro, Fiebig.“

„Estis por mi festo, sinjor' kriminal-konsilisto“, Fiebig diris kaj tiregis je sia cigaro. „Ankoraŭ kelkajn tirojn, sinjor' serĝento“, li petis la oficiston, kiu volis forkonduki lin. Post ĉi tiuj kelkaj tiroj li zorge dispremis la restaĵon de la cigaro en cindrujo kaj senhezite sekvis la policiston.

Opitz trinkis kroman glason da senkrema lakto. „Ĉi tiu malbenita afero vere ne estas simpla“, li pensis. „Nenio estas eligebla el la viraĉoj. Ĉio ja parolas por tio, ke ĉi tiu Internacio de ŝtelistoj rilatas al la misteraj mort-okazoj. Sed pruvojn mi ĝis nun ne havas. Nu, Mullerstein, tiu arogantulo, certe fariĝos cedema, kaj li faros konfeson tiel certe. kiel mi nomiĝas Opitz!“

La pordo estis puŝe malfermata, kaj kolego rapidis en la ĉambron. Li ŝvingis gazeton en la mano. „He, Opitz“, li diris, „ĉu vi jam aŭdis? Nova triobla sekreto! Ĉi tiun fojon ja ne koncernas la germanan policon.“

„Kion?“ Opitz demandis ekscitite. „Rapide donu al mi la gazeton!“ Kaj li legis: „Nova triobla sekreto je la dekdua horo — Tri ekspres-vagonaroj samtempe haltas en la tuneloj de Gotthard, Simplon kaj Mont-Cenis — Lokomotivestroj forkuras — Verŝajne intencitaj priraboj al la pasaĝeroj.“ Sekvis detalaj informoj de la Roma korespondanto. „Pro diablo!“ diris Opitz, „tio ja vere estas timiga. Kia organizaĵo tio estas! La gazeto ne estas malprava, parolante pri Paneŭropa bando. Ni estas sur la plej bona vojo por konkuri kun Ameriko! Kaj kie nun estas Neufeld?“

La telefono sonoris. Teleparolo el Romo. Anoncis sin inspektoro Casertano de la Roma kriminalpolico. „Ni ĵus kaptis la Romajn filianojn de la bando“, diris Casertano. „Parizo atentigis nin, kaj ni tre rapide plenumis la aferon. Temas pri internacia bando de rabistoj, kiu prescipe ŝtelis artaĵojn. Ni arestis ankaŭ plurajn artaj-vendistojn.“ — „Kaj ni“, diris Opitz, „jam hieraŭ kaptis la Berlinajn filianojn. Vi vidas, ke ankaŭ ni laboras rapide. Ĉu vi fakte opinias, ke ĉi tiu bando iniciatis ankaŭ la trioblan tunel-aferon?“

„Tutcerte, estimata kolego, mi estas tute certa pri tio. Se nur la svisaj kolegoj ne estus tiel malrapidemaj! La viron, kiu saltis en la Tibron, ni ankaŭ identigis: artpentristo Henriko Spiombi el Pallanza, do ankaŭ unu el la artfako.“

„Kaj kiel fartas la nemortinto kun la cerboskuegiĝo? Ĉu li ankoraŭ ĉiam ne estas esplordemandebla?“

„Ne, li ankoraŭ ĉiam dormas. Pro mi li dormu duonan jaron. Ni plenumos la aferon ankaŭ sen li.“

„Ĉu nia kolego Neufeld jam alvenis en Romo?“

„Ne, ankoraŭ ne. Cetere li ĉi tie ne trovos plu ion por fari. Li venos nur ĝustatempe por gratuli nin pro nia sukceso.“

SEPA ĈAPITRO

Sinjoro, estis demonoj!

„Ĉu la sinjoro fakte volas resti nur unu nokton? Nervi ja estas tre bela“, diris la hotelpordisto, kiam li al Neufeld proponis lian ĉambron. „En numero 18 ankaŭ loĝas sinjoro, kiu volis resti nur unu tagon. Nun li jam estas du semajnojn ĉi tie. Certe ankaŭ vi pripensos la aferon.“

„Ne, bedaŭrinde ne estas eble“, diris Neufeld, „mi devas rapide vojaĝi al Romo pro negocaj aferoj kaj ne povas prokrasti tion.“

„Ha, la negocoj!“ diris la pordisto, kiu konsideris negocojn gravaj nur, se estis liaj propraj, „la negocoj ne forkuros.“

Neufeld alvenis en Nervi proksimume je la deka oka horo kun unu horo da malfruo ekve de la okazintajo en la tunelo. En la stacio Piazza Principale en Genovo li ankoraŭ ne estis ŝanĝinta sian intencon, malgraŭ sia laceco seninterrompe vojaĝi ĝis Romo. Sed post Genovo la vagonaro veturis laŭlonge de la blua maro, kaj en Quinto Neufeld decidis, tranokti en Nervi kaj en la malfrua posttagmezo pasigi kelkajn horojn sur la bela marborda promenejo.

Ĉi tiujn kelkajn horojn li nun volis plene ĝui. Li malrapide laŭiris la palm-aleon kaj pasis tra sub la fervoja viadukto. Sur la marbordan promenejon ankoraŭ hele brilis la suno, de sur la maro blovis malforta brizo. Inter la rifoj estis multaj sinbanantoj. Kelkaj junuloj en malgrandaj boatoj kun eksterbordaj motoroj furioze rapidis tien kaj reen kaj ĉiam en la lasta momento evitis kolizion kun la rokoj. Je la horizonto oni vidis grandan oceanan vaporsipon veturantan en la direkto al la haveno de Genovo. Neufeld enspiris la mar-aeron kaj malrapide marŝis orienten laŭlonge de la promenejo. En la ombro de l' malnova anguleca turo de Groppallo, kiu iam timigu la Saracenojn, sidis infanoj kaj per kupro-mone-roj ludis „demon“ kaj „muelon“ sur kvadratoj gravuritaj sur ŝtonplatoj. Germana geedza paro, laŭŝajne faranta sian postedziĝan vojaĝon, spektis la ludon. La juna edzino volis komenci interparoladon per la dekduo da vortoj italaj, kiujn ŝi sciis, sed la provo malsukcesis.

„Corriere della Sera!“ Gazetbubo kuregis laŭlonge de la promenejo. „Corriere della Sera! La sekreto de la Alpoj tuneloj!“

„Iom tro multe da sensacio pro malfunkciinta vagonaro“, Neufeld pensis kaj aĉetis la gazeton. Sed kiam li estis leginta la unuajn dek liniojn, li ardiĝis. Li plulegis ekscitite kaj ne atentis ion alian. Li koliziis kun dika sinjoro, kies ventregio feliĉe estis elasta. La raportoj de l' „Corriere“ estis tre detalaj. Ili komenciĝis per ĝenerala informo, estis daŭrigataj per intervjuoj kun ĉeestintoj kaj finiĝis per longa, tre malgranda presita komentario. La tuto estis multe provizita per fotografajoj. Oni vidis la lokomotivon de la vagonaro, kiu haltis en la Mont-Cenis-tunelo, la kapojn de la maŝinistoj de l' Simplon-vagonaro, la belaspektan vizaĝon de l' tenoristo, kiu en la Gotthard-tunelo kantis sen honorario, kaj la modestan dometon en Faïdo, en kiu loĝas unu el la lokomotivestroj de l' Gotthard-vagonaro... (Daŭrigota)

10 Punkte

wichtig für die Praxis des Anfängerunterrichts — 10 Leitgedanken des Lehrbuchs „Wir lernen Esperanto“ von W. und H. Wingen:

- △ Lückenloser Aufbau Stein auf Stein
- △ Klare Regelfassung, sorgfältige Stoffgliederung
- △ Eingehende Erläuterungen für Einsprachler und Selbstlerner
- △ Sorgsame Auswahl des Wortschatzes
- △ Gründlichste Behandlung der Wortbildung
- △ Praktischer Übungsstoff aus dem täglichen Leben
- △ Besondere Abschnitte zur Wiederholung und Befestigung
- △ Im „Anhang“ Vertiefung des Gelernten
- △ Im „Schlüssel“ Übersetzung aller Aufgaben und wertvolle zusätzliche Übungen
- △ Im „Merkblatt für den Kursleiter“ erprobte Winke.

Preis: 2,— DM Schlüssel —,80 DM zuz. 10% für Porto u. Verpackung

Wer das Lehrbuch kennt, wird es schätzen!

Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Esperanto-Abt.



Esperanto-Lektüre für Herbstabende

Niko kaj Nina

Eine vielgerühmte Erzählung von Joseph F. Berger, die dem Anfänger zu empfehlen ist. 72 Seiten im Format 12,5 × 18,5 cm in buntem Umschlag mit 15 Zeichnungen zum Preise von 2,40 DM.

La Nekonatino

Eine der meistgelesenen Novellen der neueren deutschen Literatur von Reinhold Conrad Muschler, dem Schöpfer großer Frauenromane, in der Übersetzung von Ludwig Goppel. 70 Seiten auf holzfreiem Papier 12,5 × 18,5 cm, broschiert mit Schutzumschlag 2,— DM, als Pappband 3,— DM, in Cellophan.

Letero el la transcendo

Ein Büchlein, das man nach dem Lesen nicht ohne Erschütterung aus der Hand legt. 35 S., 12,5 × 18,5 cm, broschiert 1,20 DM.

Für Porto und Verpackung bitte 10% zugeben.

Durch alle Buchhandlungen.

**Esperanto-Abteilung
der Limburger Vereinsdruckerei GmbH.
Limburg/Lahn**

**Für internationale Kongresse!
Bei Auslandsreisen!
Für Ferienlager im Ausland!**

Zur stießenden Unterhaltung über alle Themen des täglichen Lebens hilft Ihnen unser Sprachfabrik

Sein gutes Esperanto, seine geschickte Auswahl der oft gesuchten Wörter, Ausdrücke und Sätze sind bekannt!

Preis 1,60 DM zuzüglich 10% für Porto und Verpackung!

Esperanto in der Tasche!

Skizoj pri Jugoslavio

Multoble invititaj de niaj korespondantinoj, foje viziti ilin en Jugoslavio, ni triope entreprenis vojaĝon tien. Ni intencis travivi nian trisemajnan libertempon sub la brula suno de tiu bela suda regiono. Tamen je la fino de nia forpermeso ni devis konstati, ke ni vere malpli travivis libertempon, sed entreprenis studvojaĝon tra tiu lando, ĉar ĝi estis por ni plena de multaj surprizoj, kaj ĉiu momento prezentis ion novan.

Post 27-hora vojaĝo per la Tauern-ekspreso ni atingis Novi Sad, nian unuan celon. Kore ni estis bonvenigitaj de niaj geamikoj kaj gastigantoj. Aktivan grupon de Esperantistoj ni renkontis tie. Trans Beograd ni post kelkaj tagoj veturis al Sarajevo, la orientala urbo en Eŭropo. En Dubrovnik, la perlo de la Adriatika Maro, ni ĝoje povis konstati, ke en komerca akademio instruas prof. Tomlevenoviĉ Esperanton kiel elektan fakon al ĉirkaŭ sesdek gelemantoj. En Split, la granda havenurbo de Dalmacio, ni same konatiĝis kun tre viglaj, konsciaj samideanoj.

Ankoraŭ al ĉiuj geesperantistoj, kiujn ni renkontis dum nia vojaĝo, ni ŝuldas multan dankon; ne sole pro la ĉiamaj bonakceptoj, pro la urbgvidado kaj aliaj klopodoj, sed ĉefe pro la modela gastemo kaj finfine la pacienco respondado al niaj multaj demandoj. Ne nur la Esperantistoj, sed ĉiuj renkontitaj jugoslavaj civitanoj estis tre gastemaj kaj helpemaj al ni, ĉefe la ŝupurigistoj kaj kofroportistoj.

En la nuna Jugoslavio, politike vidata, ne regas diktatoreco, sed popola demokratio, kvankam la sistemo estas komunista. Tie oni evidente interpretas tiun vorton en alia senco ol en Sovetio. Post la milito la lando okupas sin pri la solvo de granda problemo. Ne estas facile, ŝanĝi la agrikulturan, malkleran landon en kleran, industrian; sed la entuziasmaj, laboremaj jugoslavoj mirakle jam iomete sukcesigis pli novan kaj bonan ordon. Ili ne nur kreis lernejojn ĉiaspacajn, muzeojn, bibliotekojn ktp., sed ili ankaŭ senprokraste konstruas novajn industriojn.

Ĉiuj entreprenoj estas ŝtatigitaj. Nur terkulturistoj, malgrandaj entreprenoj kiel tiuj de frizistoj, ŝuistoj kaj similaj estas esceptoj, sed ili plejparte kuniĝas en lokaj kooperativoj. Ĉiu entrepreno estas kontrolata de siaj laboristoj, kiuj ankaŭ decidas pere de ĉiujare elektita komitato pri salajroj, laborkondiĉoj, pri kvanto, kvalito kaj vendprezo de la produktitaĵoj. Sed malgraŭ tio la salajroj estas tre malaltaj, la prezoj de la varoj tre altaj. Normala faklaboristo perlaboras dum monato ĉirkaŭ 9000 dinarojn (100 din. = 1,40 gm.) En Jugoslavio oni ankaŭ laboras 48 horojn semajne. La laboro komenciĝas je la 6-a horo kaj daŭras ĝis la 14-a. Nur vendejoj estas fermataj je la 12-a ĝis

la 16-a. Poste ili ree estas malfermataj dum kelkaj horoj. La jugoslavaj homoj ĉefe en la urboj ripozas dum la posttagmezaĵaj horoj. La granda varmeco devigas ilin al tio. Kiam la suno malleviĝis, ili forlasas siajn domojn kaj promenas ĝis noktmezo. Ne same bona kiel en Germanio estas tie la vivnivelo de la laboristo, sed ĝi ĉiam pliboniĝas. La ordinara salajro sufiĉas por sin nutri. Por aĉeti vestaĵojn oni jam devas ŝpari, kaj por luksaĵoj restas nenio.

Loĝejoj estas ankoraŭ raraj; kvankam oni konstruas multajn loĝdomojn, tamen la luprezoj estas tre malaltaj. (Fino sur paĝo 106)



La nuna prezidanto de GEJ, Gerd-Joachim Brinkmann

Konkurso de la junularo

Mia plej bela travivaĵo kun Esperanto

Pasis nun la festaj tagoj de la ĉi-jaraj grandaj kongresoj. Se vi ĉeestis, vi eble por la lasta fojo iris tra la stratoj de Zagreb, de Sheffield, de Wörgl aŭ de iu alia urbo, kie vi pasigis ĝojajn tagojn en la rondo de ĉiulandaj gesamideanoj. Lastfoje vi premis la manojn de viaj geamikoj, kun kiuj vi travivis multajn neforgesoblajn horojn, kaj vi rimarkis eble la larmojn en la okuloj de juna knabino, kiam vi diris al ŝi viajn vortojn de adiaŭo. Tiam via trajno ekmoviĝis kaj vin kaptis iu tristeco, kiam ĝi portis vin hejmen al via lando. La sola, kio restis al vi, estas la rememoro pri ĉio, kio estis bela...

Estas neniu inter ni, kiu ne konas tiajn rememorojn el sia Esperantista vivo, ofte nur malgrandajn travivaĵojn, kiuj tamen iam ĝojigis kaj feliĉigis nin. Eble tie estis la emociiga malfermo de via unua internacia kongreso, eble la renkontiĝo kun eksterlanda amikino aŭ amiko, kiun vi neniam forgesos, iu vespero en la societo de ĝojaj kaj gajaj gekama-

radoj el tutmondo, la vizito de via korespondanto, la alveno de pakajo kun nutraĵoj, kiun sendis fremdaj gesamideanoj dum la unuaj postmilitaj jaroj, la korespondado kun bona amikino ie en la vasta mondo, la mirinda ekskurso kun kongresanoj, la partopreno en Esperantista tendaro, la dumnokta „fantomado“ de petolemaj gejunuloj, vojaĝo al viaj eksterlandaj geamikoj. Estas tiom da travivaĵoj, kiujn ni neniam forgesos. Sed kiu estas via plej bela? Tio estas la demando de nia konkurso. Rakontu al ni pri via plej bela travivaĵo kun Esperanto. Tamen ne sendu al ni raportojn pri kongresoj aŭ kunvenoj, sed skribu pri iu tute persona travivaĵo el via Esperantista vivo, kiu treege impresis aŭ ĝojigis vin. La plej bonajn rakontojn ni premios kaj publikigos sur tiu ĉi paĝo.

Konkurskondiĉoj. La verkaĵoj devas esti skribitaj en Esperanto kaj ne devas esti pli ampleksaj ol 500 vortoj. La partoprenantoj citu sian precizan adreson, profesion kaj aĝon. Aĝlimo estas 30 jaroj. Se iu partoprenant(in)o ne deziras la mension de sia resp. ŝia nomo en la kazo, ke tiu verkaĵo estos premiata kaj publikigata, oni petu tion kaj aldonu kodvorton. La konkursaj verkaĵoj devas esti sendataj al Ewald Ebmeier, Bünde/Westf., Weidemaschstr. 28, ĝis la 10-a de oktobro 1953. Por la plej bonaj rakontoj GEJ disdonos kiel

1-an premion: 10 germ. markojn;

2-an ĝis 5-an premion: po 1 ekzempleron de la aperonta kantaro.

En la konkurso povas partopreni en- kaj eksterlandaj gejunuloj. Pri la disdono de la premioj decidos la estraro de GEJ.

Do, vi tuj prenu krajonon kaj rakontu pri via plej bela travivaĵo kun Esperanto. Ni deziras al vi multe da sukceso kaj jam atendas vian verkaĵon.



La tri lastaj prezidantoj de GEJ.

Aktuala Terminareto

Balz am/ludoj, -parado. ~flug -parada flugo
die Bermudas la Bermudoj
Bevölkerungspolitik politiko pri loĝantaro, pri popolnombro
Bohnenkraut satureo
Brutpflege vartado de l' idaro, de l' ovoj
Enzym enzimo, neorganika fermento
Europäischer Wirtschaftsrat (OEEC) Organizo por Eŭropa Ekonomia Kunlaboro
Europarat Eŭropo-Konsilantaro
Forst/wirtschaft, Wald- arbar-ekspluato, **Waldbau** -kulturo
Frischgewicht pezo de l' freŝa varo
Gelege ovaro
Geschäfts/sitzung administra kunsido, afer-. ~**führender Vorstand** administra estraro
Gummibaum (Zimmer~) (guma) figarbo [ist eine Feigensorte; alle möglichen Bäume sind gumarboj]
hitzefrei ferio pro varmego
Isolationismus (Amerika) izolismo
Kahl/fläche, ~schlag senarbigita tereno, — parcelo
Kartoffelfäule putromalsano (de ter-pomoj)
Kern/frucht molkerna frukto.

~gehäuse kernujo, koro (Enc. Vort.)
Kleinlebewesen mikroorganismo
Kreml Kremlo
Landflucht formigro el la kamparo, almigro al la urboj
Lebend/gewicht pezo de l' viva besto.
Leer- tara pezo, pezo sen enhavo
Mutter/erde, ~boden humtero
Naturschutzgebiet tereno de naturprotektio. **Vogelschutz** birdprotektio
Notquartier provizora loĝejo, help-
Personalpolitik dungopolitiko (Forst-) **Revier** (arbara, forsta) kantono (Enc. Vort.)
Rotarmisten ruĝarmeanoj
Sämling sem-plantido
Schnittblumen bukedfloroj
Schonung, Baumschule arbokulturejo
Schreber/gärtner, Klein- etĝardenisto
die Sowjets (Menschen!) la sovjetianoj
Stein/frucht kernofrukto (auch: drupo). ~**obst** malmolkernaj fruktoj
Teerose te-rozo
Torf torfo
Torf torfo
Umsiedler translokito
Vieh malpura salo
Vielliebchen ĝemelfrukto
Wetterfrosch veterprofeta rano
Wiederaufforstung re/forst/igo, -arbar- Hans Wingen

internationalen Kongresse besuchen. Man kann es keinem Vorstandsmitglied oder Vertreter zumuten, Hunderte von Mark aus eigener Tasche zu bezahlen. Es ist auch unwürdig, bei staatlichen Stellen um Beihilfen für den Besuch von internationalen Tagungen bitten zu müssen, besonders dann, wenn man den Verdacht hat, daß Vertreter der oppositionellen 5 Prozent an der Quelle sitzen.

Es ist ein Irrtum zu glauben, daß Organisationen mit den billigsten Beiträgen die besten sind. In dem Buch „Anders als ich dachte“, das der frühere englische Kommunistenführer Hyde nach seiner Bekehrung zum Christentum schrieb, heißt es richtig: „Ein Mensch, der für eine Sache nur ein paar Heller übrig hat, wird sich ihr nicht besonders verbunden fühlen. Veranlaßt man ihn jedoch zu geben, bis es weh tut, dann macht er die Sache zu seiner eigenen und wird bereit sein, dafür notfalls auch noch schwerere Opfer auf sich zu nehmen.“

Viele Esperantisten sind gern bereit, monatlich einen höheren Beitrag als 35 Pfg. zu zahlen, wenn sie die Überzeugung haben, daß der Endsieg nahe ist. An diese Kräfte wendet sich die Europa-Movado, nicht weil ihre Vorkämpfer auf Kosten ihrer Mitglieder spazierenfahren wollen, sondern weil sie ohne Geldmittel machtlos sind. In dieser Machtlosigkeit aber liegt der Schlüssel für das Geheimnis, daß 5 Prozent der europäischen Bevölkerung verhindern, was 95 Prozent als erstrebenswert und unbedingt notwendig empfinden.

Dr. Holtmann, Beckum,
Vorsitzender der Europäischen Sektion
des Deutschen Esperantobundes

Skizoj pri Jugoslavio

Ĉiu ŝtata laboristo ĝuas pagatan libertempon, senpagan socian asekuron, rajtigantan al senpaga dentista, kuracista kaj malsanuleja flegado. Patrino ĝuas ok-semajnan pagatan libertempon antaŭ kaj post la nasko de infano. Post tiu tempo ŝi bezonas ankoraŭ labori nur dum kvar horoj tage, sed ŝi tamen ricevas ok-horan tagan salajron. Por ĉiu naskita infano la patrino ricevas unufojan ŝtatan subvencion de 9000 dinaroj. Krome la gepatroj ricevas por ĉiu infano ĝis la 16-a jaro ĉiunmonatan ŝtatan subvencion de 3000 dinaroj.

Kiel ĉiu entreprenon kompreneble ankaŭ la fervojoj kaj aliaj veturiloj estas ŝtataj. La veturkostoj estas egalaj kiel en eksterlando. Ĉiu laboristo ĝuas grandan privilegion. Dum unu jaro li povas entrepreni kvar vojaĝojn je 50% kaj unu vojaĝon je 15% de la normalaj kostoj. Tiamaniere estas ebligite al ĉiu jugoslavo, pasigi sian libertempon je la marbordo aŭ ie ajn sen grandaj elspezoj de vojaĝ-kostoj. Sed vojaĝi eksterlanden preskaŭ ne eblas pro la akiro de deviso. Nur se jugoslavo povas havigi al si inviton eksterlanden, li pli facile ricevas la necesan pasporton, sed la devisdando ankoraŭ ne estas solvita.

Kiel Esperantisto oni preskaŭ pli bone povas vojaĝi tra Jugoslavio ol jugoslavo mem, ĉar oni renkontas mirige multajn samideanojn tie. Se la vojaĝanta Esperantisto eĉ estas germano, la vojaĝo estas ankoraŭ pli facilaj, ĉar multaj jugoslavoj scipovas paroli germane. Sed jugoslavo vojaĝanta en sia lando ofte spertas lingvomalfacilaĵojn, ĉar oni ne nur parolas sed ankaŭ skribas tri diversajn

lingvojn tie. En Slovenio oni parolas kaj skribas slovene. En Serbio, Kroatio, Bosnio, Montenegro kaj Vojvodino oni parolas serb-kroate, kaj finfine en Makedonio makedone. Ĉiu respubliko rajtas instrui sian propran lingvon en la lernejoj, sed krome la gelernantoj ankoraŭ devas lerni la serb-kroatan kiel la ĉefan. Malfacile por ni okcident-eŭropanoj komence nur estas, legi la kirilajn literojn, kiuj ankoraŭ estas uzataj en Vojvodino kaj Serbio. Sekve la infanoj en la lernejoj devas lerni latinan kaj kirilan skribmanierojn. Franz Frank

Esperanto-Jugend berichtet:

Unter dem Titel „Sechs Jahre internationale Verständigung durch die Deutsche Esperanto-Jugend“ ist ein 10seitiger gedruckter Bericht in deutscher Sprache erschienen, der zum Preis von 30 Pf. je Exemplar bei dem zweiten Vorsitzenden der DEJ, Ewald Ebmeier, Bünde in Westf., Weidemannstr. Nr. 28, bestellt werden kann.

Die zeitgemäße Broschüre

Zweisprachigkeit als Lösung des Sprachenproblems in Europa

von Dr. Herrmann

vervielfältigt, deutsch, 10 S. Din A 4, gegen Voreinsendung von 60 Pfg. in Briefmarken beim Verfasser: Lampertheim/Hessen, Bürstädter Str. 5

La aktuala broŝuro

Dulingveco kiel solvo de la lingvoproblemo en Eŭropo

de D-ro Herrmann

multobligita, esperantlingve, 8 paĝoj Din A 4, liverbla por du respondkuponoj. Mendu ĉe la verkinto, Lampertheim/Hessen, Bürstädter Str. 5, Germ.

Ferioj - per foliaj flugiloj

Feriovojaĝo ne ĉiam bezonas esti farata fakte kaj reale; tiu ĉi maniero eĉ havas siajn mankojn, kelkfoje. Senluziĝo enpemis kaj pli forte en la memoron kaj tie restas fiksita. Kontraŭe, ĉe la vojaĝmaniero, nun de mi montrata al vi, ne povas okazi malagrablaĵoj; neniel! Kial ne? Tuj vi vidus!

Mi mem faras mian vojaĝplanon. Tion, cetere, aliaj ankaŭ faras. Sed mi povas ĝin ŝanĝi tute laŭvole, ĉar la stacioj de mia vojaĝo estas nur — gazetoj kaj revuoj Esperantaj. Jes, el ĉiuj haveblaj periodaĵoj mi kompilas laŭ la landoj mian vojon, kiu kondukas min eĉ ĝis la Balkano... se mi deziras. Kiel? Mi ripetos: Tuj vi vidus! Nur: por ne esti sola, ni vojaĝas „sol-duope“.

Jen la unua stacio de nia vojaĝo:

Antverpeno! Estas la Beneluksa Kongreso de 1953. Tri landoj kuniĝis por festi kaj viziti la „Skeldreginon“, kiu „invitemas kun gastam“. Ŝi nomas ĝin ankaŭ „la Senegala“ (sed certe ne laŭ la Senegalo, alie ĝi estus ja „Senegalregino“). La „Flandra Esperantisto“, Heroldo-formata gazeto, kaj la „Beneluksa Esperantisto“, speciala kongresa numero, ambaŭ tre interesaj kaj legindaj, raportas detale. Grava estas rezolucio al la koncernaj ministerioj de Beneluksio, efike apogi la petskribon al Unesko.

Plene kontentigitaj kaj eĉ pli ĝojigitaj ni daŭrigas nian vojaĝon al „La Praktiko“ en Hago, la bela kaj ĉiam riĉenhava organo de UL (Universala Ligo). La Maja numero enhavas i. a. artikolon kaj bildon de la konata kataluna pioniro Delfi Dalmau, krome kiel ĉiam, kontribuoj de D-ro Privat kaj la originalan poemon „La Maro“ de Clarence Bicknell.

Rapidan viziton ni faras al „Heroldo de Esperanto“. Kiu ne konas ĝin? Neniu. Do ni ne bezonas pli paroli pri ĝi.

Ankoraŭ alia vizito en Nederlando: al „Vojo — Vero — Vivo“, eldono de la Internacia Katolika Informejo. Ĝi aperas dumonate kaj ĉiam enhavas aron da tre interesaj temoj, en la lasta numero ekz. pri la infero, kaj pri la apostolo Tomaso.

Nun ni volas fari tomete pli grandan salton, nome trans la Kanalon. Tie, en Anglujo, estas nia amiko, „The British Esperantist“, malnova, bonradicia kolono de nia movado. En la Maj-Junia numero ekz. la ĉefartikolo pri la organizo de Esperanto-ekspozicio enhavas amason da valoraj sugestoj. La artikolo estas anglalingva. Tamen oni devus deziri, ke ĝi estu tradukata por ĉiuj grupoj. Multaj vidpunktoj estas utiligeblaj ankaŭ ekster Britio. La ceteraj artikoloj kompreneble estas same legindaj. Papero kaj preso bonaj kiel ĉiam.

Tie, en Londono, ankaŭ aperas la revuo, kiu portas la standardon de UEA: „Esperanto“, en kiu ĉefartikoladas Hans Jakob kaj diskutigas gravajn aferojn la prezidanto de UEA, E. Malmgren, kaj kie sekretario C. C. Goldsmith donas siajn oficajn kaj oficialajn sciigojn.

Nun, jam estante en Anglujo, nin atakis vivega deziro ankaŭ interrilati kun niaj usonaj gesamideanoj; sed tro granda distanco kaj la neebleco povi aerplane transalti la Atlantikon, nin igis forlasi tiun intencon kaj anstataŭe nur trarigardi la „American Esperanto Magazine“. Ni trovas en ĝia Maj-Junia numero raporton pri Dr. S. Zamenhof, nevo de nia Majstro, kiu estis honorgasto ĉe la EANA-kongreso en Novjorko; historio pri la frua tempo de Esperanto en Kanado, pri indianoj, steloj kaj infero. La kajeroj havas vere elegantan aspekton.

Ĉar ĝuste nun prezentigas favora okazo, ni daŭrigas nian feriovojaĝon al Skandinavio, vizitante „Arbeter Esperantisten“, bonpavera, bonpresita organo kun varia enhavo kaj, en n-roj 4-5, recenzo pri „Kvaropo“ de F. Szilagyi.

De Svedujo al Danujo ne estas granda paŝo, kaj ni gastigas tie ĉe „Dansk Esperanto-Blad“, kiu jam ne havas la grandan formaton kiel pasintjare, sed ankaŭ en sia nuna formo estas agrabia „blad“. „Kie estas la fabeloj de Andersen?“ oni demandas en la Marta numero. Kiu tenas la manuskriptojn de la lastaj du volumoj? Oni povas reiri ĝis la Belga Esperanto-Instituto, sed pli oni ne povas sekvi la spuron, ĉar la respondeculoj obstine silentas! Kiel? ... Tia konduto estas ofendo al la rememoro pri la aŭtoro de nia lingvo. (Laŭŝajne iuj pensas, ke aŭtentikaj Zamenhofaĵoj ankaŭ poste trovos eble ankoraŭ pli bonan akcepton kaj garantios pli grandan profiton ol nuntempe.)

Tie en Danlando aperas ankaŭ „La Studento“, nova konato nia. En ĝi Stellan Engholm recenzas pri la „Kvaropo“, kaj oni legas la lastajn sciigojn pri Kvara Arkeologia Tendaro, kaj sur kovrilpaĝo, anoncon, kiu bonege konvenas en feria tempo: Da Biero Montecarlo

de la Cervceria Centroamericana S.A. El Zapote, Guatemala, oni ricevas donace du botelojn, kondiĉe ke oni estas inter la unuaj 20 petantoj. Ho ve, ni certe ne estas, kaj do ni devas kontentigi je enlanda biero, kiun ni ĝuas nun en Bremeno. „Bremena Esperanto-Spegulo“ regalaĵo nin kaj ni dankas al tiu simpla grup-informilo, kiu tamen jam aperas la kvaran jaron kaj prezentas konkursojn, traduktaskojn kaj fakesprimojn.

Ni havis emon viziti de tie Finnlandon, ĉar ni vidis „Esperanta Finnlando“, sed iom fortimigis la strangeco de la lingvo kun ĝiaj vortoj tutlinlongaj, kaj ĉefe la neebleco pro niaj financaj rimedoj, kiuj ja devos sufiĉi ankoraŭ por atingi Jugoslaviojn, la landon de nia nunjara Universala. Do, ni direktis nin al

Berlino, kien nin vokis „EJB Juna Voĉo“, vere gratulinda revueto de la Berlinaĵ junaj esperantistoj. En ĝi kaj el ĝi oni vidas, ke la Berlinaĵo ankoraŭ sur Esperanta kampo povas esti modeldona. La Juna Voĉo estas manfarita, sed kun amo kaj kun kompreno. La „Berlina Informilo“, oficiala organo de Esperanto-Ligo Berlin (ELB), ankaŭ nur modesta, sed tre lerta kaj bone komplita. Tiaj informiloj devus ekzisti almenaŭ en ĉiu landa ligo. Ni adiaŭas de la Berlinoĵoj kun bonaj deziroj, sed antaŭe ni vizitas ankoraŭ la verŝajne solan Esperantan revueton, kiu laciigas por la ideoj de Silvo Gesell, „La Libersociano“. Sed la problemoj de ĝi traktataj ne povas ĉi tie esti tuŝataj.

Nia vojaĝo direktiĝas nun suden, unue al Mannheim, kie nun en plibeligita formo aperas „Verda Stelo“, oficiala informilo de Sudokcidenta Esperanto-Ligo SOELO, kies prezidanto estis la nuna prezidanto de GEA, D-ro Hermann. „Verda Stelo“ same kiel la supre menciita Berlinaĵo Informilo bone plenumas siajn rolojn. V. St. povus sin limigi al nur ligaj kaj grupaj sciigoj.

Ni pluvojaĝas pli „malsupren“, ne al la patrinoj, sed al la kunpatro de la Gepatra Sekcio d-ro Paul en Tuttlingen, Virmemberg. Tie estas edukataj perrevue esperantistaj gepatroj kaj traktataj familiaj priestrantaj aferoj. Moravec, la patro de la Gepatra Sekcio, malŝargas sian koron pri la germana Frankfurta (ireneza aŭ procesa) kongreso. Ne ekzistus kaŭzo ĝin nomi tia, se la agado de la antaŭa estraro ne estus provokinta tian plorindan staton. Esperu ni ion pli bonan de la nova!

Sur la ĝusta vojo ni veturas nun al „La ĝusta Vojo“ en München. Ni moviĝas ĉi tie en pure katolika medio, eĉ unurilate pli papa ol la papo mem, ĉar la Heroldsbach'aj aferoj, kvankam oficiale malagnoskitaĵoj de la Eklezio mem, estas dorlotataj de la redakcio de L. G. V. kiu, eble, ĉi-rilate ne troviĝas sur la ĝusta vojo. Cetere ĝia nuna formo estas tre klara kaj enhave kaj lingve tre bona.

Ni devas nun rapidi por atingi nian celon: Zagreb, sed rapide ni faras ĉirkaŭvojon al Tirol, al „Informletero“, kiun eldonas por Tirol, Vorarlberg kaj Salzburg, Hans Steiner, la Wörgl-Steiner! ne la IEMW-Steiner. Denove modela liga buteno, simpla, modesta, sed ege cel-utila. Precipe tiuj, kiuj volas koniĝi pri la Gesell'a ekonomia doktrino (vidu supre ĉe „La libersociano“) legu en n-ro 46/47 pri la mondforma eksperimento, la „Miraklo de Wörgl“, kiu ne per griza teorio, sed per okulfrapa praktika ekzemplo montris la realigeblo de la ekonomia ordo montrita de Gesell.

Ni ne povas preterlasi fari viziton ankaŭ en la Viena „Hofburg“ ĉe la IEMW, la Internacia Esperanto-Muzeo Wien kaj lia meritplena direktanto kortega konsilisto Hugo Steiner. Lia „Informilo“ donas ne nur detaliajn informojn pri la muzeo, sed ankaŭ pri aliaj interesaj aferoj esperantistaj. Entute ŝajnas, ke ĉiuj „informiloj“ estas bonaj, eĉ tre bonaj, kvankam modestaj, propagandiloj.

Sed nun seninterrompe al „La Suda Stelo“, kiu lumas super Zagreb. La

lastajn prikongresajn novaĵojn ni eksciis jam antaŭe, ekz. pri Belarta konkurso por Arto Grafika kaj Plastika, kiu antaŭe ne ekzistis. Krome estas pliaj surprizaĵoj, nome ke Tito estas esperantisto! Ĉu tio estas propagand-atuto aŭ ne? Bildo de lia naskiĝdomo en la vilaĝo Kumrovec kun apuda lia statuo troviĝas en „La Suda Stelo“ n-ro 127. Sed for la paperajojn, ĉi tie fontas la vera esperantista vivo, ĉi tie estas la nova mondo, en kiu la popoloj faras en konsento unu grandan rondon familian. Ni sentas nin feliĉaj kiel eroj inter sampensanoj kaj deziras, ke ĉiam regu tiu bela kamaradeca stato.

Sed ĉio pasas, eĉ UK, kaj ni devas, kun peza koro, ree forlasi tiun belan landon Jugoslaviujo. Sed la sudo tiel forte nin altiras, ke ni decidis fari „ekskursejon“ al la najbara Italio kaj ni vizitas tie, en Torino, la monatan informilon „Verda Steleto“ de Centra Esperanto-Oficejo. Ree „informilo“, kaj ree bona kaj interesa kaj, kio estas precipe atentinda, kiu dediĉas sin, sen politikaj aŭ partiaj celoj, al la disvastigo de Esperanto inter la laborista klaso itala. Ĝi ne timas prezenti (kun teknikaj desegnoj) eĉ radioaparatojn (de interne kompreneble, ne de ekstere!). Krome ĝi estas nun la sola itala Esperanta gazeto aperanta, kaj kvankam ne presita, tamen aspektas tre klare, eĉ impone.

Sed ankaŭ de niaj italaj geamikoj ni devas adiaŭi. Facilanimaĵ, kiaj ni estas, ni en la Genova haveno rapide suriras ŝipon nin portantan al Hispanio, kaj tie ni surteriĝas en Valencia, kie ni volas saluti la kolegojn de „Boletin“, tiu interesa kaj saĝe redaktaĵo organo de la Federacio Esperantista Hispana. Ĉiam ĝi enhavas ion specialan, kaj tial ni rimarkas, apud „Recepto por frandemuloj“ (kuir-receptoj estas tre maloftaj en Esperantaj gazetoj); ĉu esperantistinoj ne ŝatas foje surtabligi ion, kion rekomendis alianda samideano? kelkfoje eldirojn de gravaj viroj neesperantistaj; en la n-ro 6 ekz. de A. Maurois, fama membro de la Franca Akademio: „La kontuzo de la lingvoj kontribuas forte... al la mensa malsameco. Ĝi faras el ĉiu eksterlandano specon de monstro... hermetike fermita kiel vulpo aŭ taŭro. Kun kelkaj esceptoj ŝtatistoj aŭ negocistoj esprimas sin ĝene kaj malfacile en fremda lingvo.“ — Ni dezirus ankoraŭ longe revii apud la marbordo Hispana kaj ĉi tiel al ni:

Niaj revoj estas ĉiam kvazaj papilioj belaj, malproksime briletantaj, puraj kaj mirinde helaj. Sed kapitaj en la mano. Ili estas nur vermetoj, nur ludiloj de infano.

(José Martínez, Zaragoŝo).

Sed pelas nin for la sankta Necesoj.

Tra Francio kondukas nin nia vojo al „Franca Esperantisto“. Grava temo tie diskutifiĝis: Aktivisto laciĝas; ĉiam organizaj demandoj, ĉiam ŝarĝoj, kiuj falas sur la ŝultrojn de la samaj...

Um die Verbreitung des Esperanto auf billiger und leichter Grundlage zu fördern, haben wir einen

Esperanto-Fernlehrgang

ingerichtet. Kostenlose Auskunft über Teilnahme-Bedingungen durch Esperanto-Gruppe Bonn, Nordstraße 97

Marij Andrade, av. Margues de Beas, 66-ap 2, Salvador (Barra), Bahia, Brazilo, 20jara studentino, deziras korespondi.

Deziras korespondi pri Monda Demografio por pruvi ke paco savigos per nia lingvo, s-ino Marthe Coullart, 6 bis, Rue Carnot, Versailles, Francio.

Internacia Esperanto-Muzeo, Wien I, Hofburg, Batthyanystrasse, serĉas fidindan vigan samideano(n)on kiel reprezentanton por Germanio.

Mi dezirus korespondi kun germanaj geamikoj pri metiist-unuiĝaj aferoj en Germanio, kaj ankaŭ, se eble, kun geamikoj kiuj estas geanoj de la SPD. Mi mem estas ano de la Laborista Partio de Granda Britio kaj ankaŭ ano de la Bakista Unuiĝo ĉilande. La celo ĉi-tiukaze estas, ke mi tre interesiĝas pri Germanio kaj germanaj aferoj, kaj deziras plibonigi mian komprenon pri la nuntempa vivo en Germanio. Albert Laverick, 46 Station Road, Hetton-le-Hole, Co. Durham, Anglio.

kaj la ceteraj indiferentas. Kial? Ĉiam tiu seka vorto „organizo“: sur iuj la laboro ĉiam amasiĝas, per propra forto ili devas ĉion elpensi, inventi, ordigi, kaj konstante refari kion ili jam antaŭe provis kaj la tempo detruis. La aliaj? Nu, kian intereson havi en nura organizado? Ĉu ĝi estas nia nura celo? Kiu ebligas al ni ion alian? Ion pli grandan, pli grandiozan?”

Tiujn pensojn ni kunportis al Parizo, al la Av. Gambetta, kie „sidas“ eĉ tri periodaĵoj: „SAT-amikaro“, „Sennacieca Revuo“ kaj „Sennaciulo“, reprezentantoj de la socialisma branĉo de l' Esperantismo (aŭ ĉu pli ĝuste klasbatalema?). Nu, ĉiu ja konscias, ke tiu alo de nia movado estas kvazaŭ la kontraŭpunkto de UEA, sed same grava kiel la alia. La eldonaĵoj, precipe „Sennaciulo“, estas tro konataj, por esti ankoraŭ speciale prikskribataj, kaj iliaj temoj estas temoj unualoke per-, ne poresparantaj. „SAT-amikaro“ en sia Junia numero donis tre interesan raporton pri Jugoslavio, kiun ni nun, travivinte semajnon tie, povas senrezerve konfirmi, escepte de kelkaj privataj opinioj. „Sennacieca Revuo“ (n-ro 81) prezentas grandan nombron da interesaj artikoloj el multaj kampoj de l' vivo kaj scienco. Ankaŭ la gaja muzo ne mankas, kaj ĝin reprezentas kompreneble R. Schwartz. Papero kaj arango estas bonaj, nur la bildoj ne ĉiam kontentigas. — Ni ĝuas ankoraŭ kelkajn tagojn en la bela Sejn-metropolo, sed jam devas nin direkti al nia lasta stacio: Svislando.

„Svisa Espero“ ŝanĝis sian aspekton: ĝi fariĝis iomete pli... kiel mi diru: pli amatoreca. La enhavo restis, kiel ĉiam, viva kaj interesa. — Sed kun konsterno ni konstatas, ke morgaŭ niaj ferioj estos pasintaj. Restas do nenio alia ol — rapidvagonaro. Kaj obeeme ĝi rekondukas nin al nia elirpunkto. Punkto. Lao.

PS. La legintaro bonvolu pardoni ke la tempa akurateco kelkfoje estas neglekta.

La sorĉita kalendareto

Mi ne scias, iel la unua duonjaro de 1953 ŝajnis aĉe sorĉita. Kelkaj miaj entreprenoj staris sub stranga stelo, kiun mi povus nomi „stelo de malfruigo“. Ĉiam, kiam mi fiksas ian rendezuon, mi fiaskis. Ekzemple jam en januaro: Mia amiko Sebastiano min estis invitinta al sia nomfesto, la 20-an. Mi plezure akceptis, veturis tien kaj — staris antaŭ ŝlosita pordo. Lia ĉambromastrino diris, ke li forvojaĝis. Kaj lia festo? Jes, sed ĝi okazis jam hieraŭ. Nu, mi pensis, li devis ĝin antaŭarangi pro la vojaĝo, kaj konsolis min per tio.

Sed pli malagrabla estis rendezuo, kiun mi havis kun fraŭlino, kiun mi konis nur tre mallonge. Ni interkontentis renkontiĝon ĉe karnavala balo. La tago estas kvazaŭ engravurita en mi: la 15-a de februaro 1953.

La rendezuo loko estis la bela salonego „Vintroĝardeno“. Si volis veni kiel „reĝino de la nokto“. Vere, malgraŭ la multaj steloj, kiujn mi vidis ĉe mia alveno, la noktoreĝino mankis. Mi estis senkonsola. Mi konsultis mian kalendareton: ĝuste, la interkonsentita tago estis la 15-2-1953. Mi staris ree antaŭ enigmo. La kalendareton mi enpoŝigis en mian maskokostumon, kaj nur post du monatoj mi ree trovis ĝin tie, kiam mi hazarde aliordigis mian ŝrankon.

Sed la plej ĉagrena estis la tria kazo, en kiu ree la kalendareto ludis la malbenitan ĉefrolon. Por la fino de junio, la 27-an, ni, t. e. mia ĉarma amikino Hela (la „noktreĝino“ definitive estis malaperinta en la nokto de l' forgeso), mia amiko Fredo kaj lia fianĉino Flora estis fiksintaj dusemajnan feriovojaĝon. Ni starigis tute detalan planon kaj ĉiu ricevis kopion.



Kiu, rigardante ĉi tiun ĉarman junulinon, ne diras, ke ankaŭ Septembro estas tre agrabla monato? Eĉ se la ferioj jam pasis... ne grave! La belaj rememoroj restas, kaj se ili aspektas kiel nia ĉi-supra bildulino, des pli bone, ĉu ne?

Tie mi legis: Forveturo: la 27-6-1953, je la 6.31 h. de la ĉefstacidomo. Akurata kia mi estis, mi precize je la 6a matene ĉeestis sur la ĝusta fervoja kajo. Kiuj ne ĉeestis, estis miaj geamikoj. Mi ne perdis la esperon ĝis la lasta momento. Sed kiam la vagonaro jam ekmoviĝis, mi ne plu povis atendi. Per kuraĝa salto mi envagioniĝis, furioza kaj samtempe malĝoja pro la neklarigebla foresto precipe de Hela, sed ankaŭ de la aliaj.

Laŭ mia plankopio mi tranoktis en la tie indikita loko. Kiam la mastro eksciis mian nomon, li transdonis al mi bileton. Ĝi estis de miaj geamikoj kaj enhavis la vortojn: „Daŭrigu laŭ la plano!“ Krome nenion! Bone, mi obeis. Same okazis la duan vesperon, la trian, dum tuta semajno. Tiam mi sidis jam plena de malespero vespere ĉe mia manĝo, kiam subite iu kovris de malantaŭe miajn okulojn. Kiu estis? Hela! Post la komenca ĝojego pri la

revido mi eksplodis, riproĉegante ŝin kaj la aliajn du pro ilia stranga kaj malafabla konduto. „Ho, ho!“ diris subite du voĉoj malantaŭ mi, „ekonu vin mem! Vi estis la malakuratulo, la neprecizulo, kaj por tio vi bezonis esti iomete punita.“

Mi kompreneble ĉion refutis, kaj por pravi mian pravecon, mi montris mian poŝkalendareton, laŭ kiu mi min direktis por la vojaĝo. Estis la beleta EK-kalendareto. Fredo rigardis ĝin, unue supraj, poste detale, fine li rid eksplodis, montrante al mi ankaŭ sian poŝkalendareton kaj indikante per fingro la komencdaton de nia vojaĝo. Ĉe li ĝi estis la 27-6-1953, sabato, ĉe mi la 27-6-1953, dimanĉo! Do, rezultis: Mia beleta EK-kalendareto malfruas je unu tago dum la tuta jaro 1953! Nun mi komprenis ankaŭ la antaŭajn du malrenkontojn. Ho, vi malbenita EK-kalendareto! Beko.

